4-a Jaro. N-o 175 APERAS  SEMAJNE 9. Februaro 1928

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanty

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

RELIGIA MORALO

Mensogi estas malmorale, ĉu ne? — Do, rakontante al infanoj aferojn, je kiuj mem oni ne kredas — ekzemple pri religio — oni plenkonscie mensogas. Sed, rakontante al infanoj aferojn malprudentajn kaj pro religia timo malpermesante al ili demandi la kialojn, oni edukas kredmaŝinojn pretajn, kiuj aprobos ĉion, kion postulas de ili ŝtato kaj eklezio. Ĉar infano punita pro nekapableco percepti dogman sensencaĵon, certe evitas demandi, nekomprenante la natursciencan lecionon.

Dum la eklezia kunveno en Basel (Svisio), en la jaro 1439, la Franciskanoj sukcesis trudi al la kunvenintaro sian dogmon, ke la virga koncepto de Mario estu: "Pia dogmo, konforme al eklezia kulto, al katolika kredemo, al sana (?!) prudento kaj al sankta skribo".

Tamen ĉi-decido tiutempe ne jam povis atingi laŭleĝan konfirmon; ĉar la Dominikanoj, — la popolo nomis ilin vulgare nur: "domini-canes" = hundoj de la sinjoro, — la plej fervoraj persekutantoj de la herezuloj, kontraŭis ĉi-decidon kaj ĉar la papoj ne jam kuraĝis intermalpaciĝi kun ĉi tiuj piaj spionoj. Intertempe la Jezuitoj kaj Franciskanoj komencis la sekretan intrigadon ĉe ĉiuj katolikaj kortegoj, kiuj kaŭze de tio petis la papon, oficiale konfirmi la virgan koncepton de Mario. Singardeme la papo Gregoro XV-a respondis al Filipo III-a de Hispanio: "ke la eterna saĝeco ne jam estas senvualiginta al li la kernon de la sekreto". — Pius IX-a kunvokigis en la jaro 1854 la episkopojn en la vatikanon. La 8-an de decembro tie en la Petro-preĝejo estis prezentita al la kredemularo tre bone aranĝita spektaklo. Ornamita per triobla krono la papo suriris la tronon, antaŭenpaŝis la dekano de la sankta kolegio kaj petegis en la nomo de la tuta kristanaro dian verdikton pri la koncerna temo. Respondis la papo, ke li unue devus voki la sanktan spiriton, por povi esti kapabla permesi tiun peton. Do, estis citita la sankta di-spirito kaj ĵus kiam la "Veni Creator" estis kantita, la spiritcitado tiom efikis, ke la papo tuj povis prelegi la jam skribitan verdikton. La dogmo diras: "La sankta virgulino Mario de la unua momento de sia koncepto per la unika favoro kaj privilegio de la Ĉiopova kaj konsiderante la meritojn de Jezuo Kristo, la savanto de la homaro, estas liberigita kaj gardita kontraŭ ĉiuj heredpekoj". Ĉi tiu dogmo estas senvualigita de dio mem kaj pro tio devas esti kredata de ĉiuj kredemuloj firme kaj konstante.

Devas esti kredata firme kaj konstante. Kiu ne faras tion, estas herezulo kaj pagu — kelke da SAT-akcioj. Sed infanoj devas ĝin kredi, ĉu helpe de bastono ĉu sen tiu.

En tia marĉo da prudento kripligita, kompreneble ĉia absurdaĵo povas prosperi.

Sed, ke oni ne kredu, ke la papo eble estas erarinta, oni oficialigis en la jaro 1870, do, meze en la civilizita 19-a jarcento, la senerarecon de la papo. Jam pli frue aliaj arogantaj papoj sin deklaris seneraraj kaj "alia dio surtera", kiu same ne eblas erari kiel la alia dio enĉiela. Pro tio la papo estis senerara en siaj "Ex-Kathedra"-eldiroj pro papa rajtigo.

La 13-an de julio 1870 okazis la voĉdono de la ĉefepiskopa kunsido en Romo. La 18-an de julio la dekreto estis oficiale publikigita en la Petropreĝejo en Romo per la koncernaj ceremonioj. Por tiu celo la papo speciale estis aranĝinta por si pompan tronon antaŭ la orienta fenestro. Tie sidis la anstataŭanto de la malriĉa migremulo nazarena, ĝispiede envolvita en multekostaj juvelaĵoj, ke ili per la reflekto de la sunradioj briligu lian ĉielecon. Lin ĉirkaŭis kardinaloj, patriarkoj kaj episkopoj en ne malpli pompaj vestaĵoj, kiuj ankoraŭ ĉiam efikas je la amasoj.

Nur la leviĝanta suno ne kontentigis sian "sanktecon" kaj ĝi tute ne ekbriligis la fajron de la diamantoj kaj rubenoj, kvankam la papo jam frumatene okupis la orientan fenestron. La nebuloza mateno eĉ pli malheliĝis, ne estis eble, krei brilegantan diobelegecon. Ja, eĉ ne kapablis legi la "eta dio" ĉe la taglumo kaj li devis sendi iun por alportigi kandelojn; sed ĉar la vantulo eĉ ne povis legi ĉe kandela lumo, li komisiis kardinalon je tio. Tiu ankoraŭ ne multe estis leginta, kiam el la inkonigra ĉielo ekflagris brilega fulmo kaj aŭdiĝis konsterniga tondro en la nigrega mallumeco, ke la kardinalo timigite interrompis la legadon kaj alia kardinalo tremante ekleviĝis kriante: "Tio estas dia voĉo, kiu parolas per la tondro de Sinaj!"

Per tio la dekoro estis konservita, se ankaŭ aliel kiel estis intencite. Sed depost la malsukcesinta opereto la papo estas senerara. Oni ĉi-lande imagas al si, ke ĉiujn etikajn kaj spiritajn bonecojn oni dankas al la kristaneco. Hospitaloj, ne nur por homoj, sed eĉ por bestoj, jam ekzistis en Hindio, antaŭ ol la nova testamento estis furioziginta la homon. Nervsanigejoj jam ekzistis antaŭ Mozeo, se estas permesate fiksi la tempon per uzo de mitaj figuroj.

La giganta fama biblioteko en Aleksandrio estis idolana verko kaj se ĝi ne estus forbruligita, hodiaŭ oni hontus, publike sin deklari ano de la kristaneco. Dum la Maŭroj en Hispanio instruis laŭ globoj geografion, la eklezio persekutis ankoraŭ la proklamantojn de la nuntempe sola percepto, ke la tero estas ronda globo. La kristaneco nur ĉiam konis reakcion, malhelpadon de la progreso, de la sciencaj rekonoj; dum jarcentoj ĝi nur okupiĝis pri la detruo de la spiritaj valoraĵoj de aliaj popoloj kaj rasoj.

Paperon, tipografion, skribon kaj multajn aliajn aferojn, ni dankas al la ĉinoj, hindoj, araboj, antikvaj egiptoj kaj babilonoj. Do la eklezio ĉion ĉi misuzis. Nenian uzeblan scion, nenian liberigan faron alportis la kristaneco. Nur kondamnado kaj stultigo estas la verkoj de la kristaneco. Reviviĝon, ĉieliron ili havas spite al la gravitado kaj mondpercepto, inferajn punojn kaj aliajn teruraĵojn. La kristaneco frenezigis pli da homoj, ol ĝi kapablis konstrui da frenezulejoj. Oni devigu kritiki orientulon pri la kristanaj nacioj: li certe timigite-malestime elmontros al ni, kian frenezulejon Eŭropo reprezentas en la okuloj de homo ĝuanta sanan menson. Nur vanteca imago kaj fiereco ne lasas vidi al ni, kiom ridindaj ni estas por aliaj rasoj — pli ridindaj, ol ŝajnis al ni iam ajn ĉinoj aŭ kafroj.

Ĉu la "feliĉiga evangelio", la subtenanta kolono de la kapitalismo, iam jam alportis al la popoloj en ia ajn afero ion utilan? Ĉu ekzistis antaŭe pli da malsanuloj, pli da ekspluatitoj, pli da mizeruloj, pli da forlasitoj, kiuj devis mortmalsati? Ĉu antaŭ la kristaneca epoko ekzistis pli da malsatantaj publikulinoj, ĉu pli da senskrupulaj monĉasantoj, ĉu pli da malzorgitaj infanoj kaj ĉu pli da friponoj ol en niaj milionurboj kun dekduoj da preĝejoj? —

Ĉu la sklavo en la antikva Romo aŭ Grekio ne estis gardita kaj sekurita, dum la hodiaŭa sklavo, la proleto, estas elliverata al la sorto senindulga? — Tre karakterize estas, ke ne nur bibliaj tekstoj estis menciitaj kiel pruviloj por la praveco de la sklavigado, sed ke la unua ŝipo, kiu fornaĝis de la angla bordo sub ordono de sinjoro John Hawkins, por aĉeti en Afriko "nigran eburon", t. e. nigrajn sklavojn por Okcidenta Hindio, portis ĝuste kiel nomon: "Jezuo".

La bigota, piaĉa hispana registaro dum la daŭro de du jarcentoj estis kontraktinta pli ol dek liverintertraktatoj rilate al la vendado de pli ol kvin milionoj da sklavoj en la nomo de la "sankta triunuo". Rezulte, el tio ĝi enkasis pli ol kvindekmil funtojn da imposto.

Sed tamen: Tiuj sklavoj kostis al la posedantoj monon kaj pro tio, kvazaŭ havaĵo, estis bone nutritaj kaj kontraŭ malsaniĝoj garditaj. Do, kiu hodiaŭ interesiĝas pri modernaj sklavoj, kiuj vivaĉas en malsanigaj domaĉoj kaj keloj, kiuj mizeras pro malsato kaj malpuraĵo kaj kiuj nur ĉiam devas naskadi naskigadi, nur, por ke la laborfortoj ne malpliiĝu, sed ĉiam restu troaj kaj malmultekostaj? Ĉiarimede oni helpas, por ke unu la alian mortigu pro panpeco aŭ minimume forpuŝu, kaj por ke la riĉuloj ankoraŭ pli povu elsuĉi ilin.

La porko posedas sian akvujon kaj manĝujon; nur la homo devigata oferi sian laborforton, tute estas senŝirma kaj ekster la juro. Li ne rajtas vivi, li rajtas mortmalsati kaj neniu pro tio estas akuzata aŭ vokata antaŭ la juĝistaro.

Kaj tion oni nomas "dionplaĉan ordon". —

Kiam la kristanaj bandoj estis forpelintaj la Maŭrojn alte-civilizitajn el Hispanio — depost tiu tempo forvelkis la alta kulturo de ĉi-lando — ili trovis inter aliaj aĵoj ankaŭ astronomian observejon en Sevilla. Ĉar la cerbaĉoj de frenezuloj ne estis rutinitaj por scii, kiamaniere utiligi tiajn komplikitajn instrumentojn, oni simple aliigis la observejon en — ne ridu — preĝeja sonorileja turo. — Kaj tiamaniere oni tute kristaneckarakterize servis al la scienco.

Otto Wolfgang.

El "Atheist", kajero 5-a, majo 1926,

esperantigis: *Robert E. Bitter.*

EL ESTONIO

La vivo de Laboristaro en Türi kaj ĉirkaŭaĵo

Baldaŭ jubileos la registaro de Estonio la 10-an datrevenon de la respubliko. Kion oni povos konstati je tiu dato, ĉu progreson? Tion certigas la burĝaro ĉiutage. Sed tion oni povas neniel konstati, ĉar la vivo parolas alian lingvon. Necesas nur ekrigardi la ruinaĵojn de la fabrikoj, kiuj ripozas en sia mortdormo kaj kiujn la "tempodento" laŭ sia volo mordadas. ("Dvigatel", "Putri tehased", "Ilmarine" kaj aliaj pli malgrandaj —). Ĉi tiuj fabrikoj ne funkcias pro tio, ke mankas merkato.

La paperindustrio pli-malpli funkcias, ĉar ĝi havas la merkaton precipe en Sovetio.

En Türi estas paperfabriko, kie laboras proksimume 400 laboristoj.

La 1-an de novembro ekaperis ĉe la pordego de la fabriko afiŝo, ke la 15-an de novembro estos maldungataj 104 laboristoj! Tio — laŭ la burĝoj — estas leĝe kaj ĝentile farita: Nur du semajnojn antaŭ la maldungo estas anoncite, kaj — ĉio estas en ordo! Ĉiu laboristo devas nun serĉi por si novan laborlokon. Sed alia demando: — Ĉu ekzistas laboro? Bedaŭrinde nenie ĝi ekzistas.

Maldungotaj laboristoj rigardas en la vintron kaj vidas la minacantan mizeron, malsaton kaj malvarmon. Ĝis nun oni povis ie! nutri sin kaj la familio per la mizera salajro, sed nun . . .

La meza salajro estas en la paperfabriko 140 mk.[1]) tage. Kiu havas familion ricevas, krom la salajro, subvencion de la fabriko, por edzino 25 mk., por ĉiu neplenaĝa infano 15 mk., *sed nur por tri infanoj* kaj nur por tiuj tagoj, kiam laboristo laboris. La necesaj manĝaĵoj kostas jene: 400 gramojn da pano 8 mk., 400 gramojn da porkaĵo 45 mk., da butero 90—100 mk. kaj plu, 1¹/₆ litroj da lakto 16 mk. Plej malmultekosta somera vestaĵo kostas 4000 mk.

La maldungigon la administracio de fabriko motivigas per manko de laboro kaj per manko de merkato por papero.

En la ĉirkaŭaĵo estas aliaj malbonaĵoj. Tie laboristoj neniam vivis normale; ili tie ĉiam vegetis.

Sed nun trafados laboristojn alia malfeliĉo: nepagado de salajroj! Tiu nepago de salajroj jam fariĝis tradicia fakto. La juĝejoj traktas tion supraĵe. Sed kiam postulas iu banko aŭ riĉulo sian pruntedonon, tiam verdiktas la juĝisto laŭleĝe!

H. P.

[1]) dolaro = 375 mk. est.

Ĉu jam troviĝas en via esperanta libraro la unika verko, kiu ebligas komprenon de la homaj problemoj kaj historio, la *unua proleta atlaso?* Se ne, havigu al vi ĉi belan instruan verkon.

MALGRANDA TERBIBLIO

originale verkita en esperanto de Prof. D-ro FERD. SZERENYI.

ENHAVO: 11 grandaj landkartoj kaj multaj skemoj

kun klariga kunteksto sur bonega papero.

Form.: 26×36 cm. Prezo: **1,80** g. m.

Havebla ĉe la Administracio de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig-O-27 (Germanio)

Indiĝenaj moroj en Angola

(Portugala okcidenta Afriko)

(Daŭrigo unua)

LA “KIMBANDA“ — EKSPERTO-MEDICINISTO

Ni jam sciiĝis, per antaŭa artikolo, kiamaniere la “kimbanda“ plenumas sian plej gravan, almenaŭ sian plej oftan taskon: la “kuracadon“ de siaj samgentuloj, ĉu per aplikado de determinataj plantoj, aŭ per uzado de primitivaj aŭ superstiĉaj rimedoj.

La indiĝenoj konsideras lin, kaj plej ofte li ankaŭ sin mem, kvazaŭ supera estaĵo ĉionscianta kaj neniam trompanta sin.

Bedaŭrinde tro ofte (kaj tio okazas ne nur ĉe negraj, sed ankaŭ ĉe l' plej blankaj kuracistoj) la malsanulo mortas. (Kiom ofte pro la rimedoj!)

La simplanima negro kredas, ke la morto ĉiam estas kaŭzata de fetiĉaĵo, de sorĉaĵo, per kiu aliulo celtrafis la mortinton, ĉu pro malbono, pro envio, aŭ pro ia alia kialo. Kompreneble, la “kimbanda“ ankaŭ tion kredas aŭ simple kredigas.

La malsanulo mortis malgraŭ aŭ sen liaj zorgoj. Do, enmiksiĝis fetiĉo. Li ne sukcesis ĝin malkovri, sed li plencerte “sukcesas“ malkovri la sorĉiginton.

Tiamaniere li almenaŭ iel kompensas la malsukceson de siaj kuracmetodoj kaj samtempe plenumas “justigan“ rolon, ĉar, laŭ la indiĝenaj kodoj, la sorĉado estas punenda krimo.

Jen tamen per kia stulteca maniero li faras tion:

Kiam la kadavro jam kuŝas en la “tipója“[1]) la “kimbanda“ *demandas* al la mortinto, kiu enfetiĉigis lin. La du kondukistoj tuj ekmoviĝas kaj kvazaŭ trenataj de la mortinto marŝas ĝis iu ajn (aŭ antaŭe celita) kabano, kies loĝanto estas tiam konsiderata, kiel la k r i m u l o. La “kimbanda“ lin nepardoneble kondamnas pagi monpunon, kioman postulos la familio de l' mortinto, aŭ ĝi estas fiksata laŭ la kutimo. Nur post tia “jurceremonio“ la enterigo okazas.

Tiu kutimo estas ĝenerala ĉe ĉiuj indiĝenoj; nur la puno estas malsama laŭgente.

Ĉe iuj, la akuzito pro “mortiga fetiĉo“ estis kondamnita fordoni al la familio de la mortinto ĉiujn siajn nevojn, aŭ, se li ne havis, determinatan nombron da sklavoj, por esti vendataj aŭ ... manĝataj, se aĉetanto malestis. Ĉe aliaj la malfeliĉulo montrata, kiel krimulo, estis ankaŭ mortigata kaj, se ĉi-kondamno atingis edziniĝintan virinon, la edzon oni ankaŭ devigis fordoni unu sklavon kaj unu porkon.

[1]) Kondukilo por personoj konsistanta el felo aŭ forta drapopeco, per du randoj pendanta el longa stango, kiu estas portata de du personoj sur la ŝultroj.

Nuntempe, verŝajne, tiuj barbaraj kutimoj estingiĝis, aŭ estas nur tre maloftaj: la imagata krimulo estas nun kondamnata fordoni kelkajn bovojn aŭ porkojn, aŭ kelkajn metrojn da drapo.

Ĉe la indiĝena tribunalo, la rolo de la “kimbanda“ estas ankaŭ tre grava, ĉar li juĝas superinstance, li tranĉas la gordian nodon de la aferoj.

Kurioza estas la indiĝena tribunalo:

La juĝado estas publika kaj okazas en la “libata“[1]) de la akuzito. Ĝenerale ĉeestas ĉiuj loĝantoj de la “sanzala“[2]) kaj de la proksimaj ceteraj “sanzala“j, kiam la afero estas pli grava. Ili tamen ne enmiksiĝas je la diskutado kaj nur fajfas aŭ laŭtkrias, kiam la atestantoj sin kontraŭdiras, aŭ la partioj (akuzato aŭ akuzanto) sin montras falsdeklarintaj. Antaŭ la tribunalo la plendanto rajtas nur formuli sian plendon kaj la akuzato prezenti sian defendon. Ili ambaŭ estas subtenataj de “advokatoj“, kiom ajn ili volas. Nur dank' al ĉi-lastaj la debatoj fariĝas viglaj.

La prezidadon de la tribunalo plenumas la “soba“[3]) helpata de la konsilantaro de “Makota“-j aŭ “kilamba“-j[4]).

La aferoj plej ofte juĝesplorataj de l' tribunalo estas adulto, fetiĉaĵo, ŝtelo, ŝuldoj kaj kalumnioj. La krimoj plej grave punindaj estas ŝtelo kaj sorĉagoj. Tamen la ŝtelo nur estas punata, kiam la ofendita persono devenas el la sama “soba“-regno, kiel la ŝtelisto. La ŝtelo al fremdulo estas nepunenda.

La juĝesploro en la tribunalo daŭras dum tagoj, semajnoj kaj eĉ monatoj kaj finfine la venkita partio estas kondamnata pagi la punon deciditan kaj la “kostojn“ por la “soba“ kaj “kilamba“-j.

Se la venkita partio ne konformiĝas al la decido, ĝi tamen rajtas apelacii al la tribunalo de l' “kimbanda“, kiu decidas lastinstance. La “kimbanda“, tiacele alvokata, iras al la koncerna “sanzala“, aranĝas “kubata“-n[5]) ekstere, meze de la kampo, kaj tie, ludante la “puita“-n kaj la “batuk“-ojn[6]) alvokas la popolon por la rea juĝado. Je ĉi-ties fino la “kimbanda“ decidas jenamaniere: El monujforma saketo ŝafidfela portanta du dividojn, li ĉerpas po unu plenkulero de du apartaj polvoj similaspektaj, ĵetas ilin en apartajn kruĉetojn enhavantaj akvon kaj senelekte transdonas la du miksaĵojn por trinki, unu al la plendinto kaj la ceteran al la akuzito. Unu el tiuj polvoj estas neofendiga; la alia estas “gundu-gundu“ (speco el manihoto), tre aktiva veneno. Tiu, kiu trinkis la venenon “estas la krimulo“.

Nuntempe oni tuj igas lin trinki la antidoton (kontraŭvenenon) kaj li estas kondamnata pagi la fiksatan punon, ĝenerale per mono aŭ brutaro; antaŭe oni lasis, ke li mortu kaj lia familio estis sklavigita.

Pli-malpli same, kiel ĉi-supre, la “kimbanda“ agas ĉe ĉiuj indiĝenaj gentoj de Angola.

J. P. Barreira.

[1]) Kabanaro kaj grundo de unusola persono aŭ familio. (= Bieno.)
[2]) Indiĝena vilaĝo. Aro de “libata“-j.
[3]) Indiĝena reĝo, de kiu dependas unu aŭ pluraj sanzala“-j, kelkafoje eĉ tuta gento.
[4]) Ministroj kaj asesoroj de “soba“.
[5]) Kabano. Indiĝena domaĉo konstruita per stangoj kovrataj de pajlo.
[6]) Tamburspecaj bruaj muzikiloj.



La polico de Dio

Anton Krenn, liberpensa lekcianto, antaŭe katolika pastro, estis kondamnita la 1-an de julio en la jaro 1927 ĉe la juĝejo en Innsbruck (Tirolio, Aŭstrio) al peza punlaboro en malliberejo por



unu monato pro sia lekcio, kiun li faris en jaro 1926. La jenaj frazoj de lia parolado estis fatalaj por li: “Kie estas la justa dio? Kie estas la kompatema dio? Estas tarifo por mesoj, baptoj, edziĝoj, funebraj solenoj. La plej sankta afero estas impostata. La eklezio faras profiton el ĉio, kion ĝi instruas. Ne dio kreis la homojn, sed la homoj kreis dion. La religio estas knuto por la popolo, kaj la pastraro estas la polico.“ Pro tiaj diroj Krenn estis punita. Se la afero ne estus tiel serioza, oni povus ridi. Rea pruvo, ke la juro estas fidela servanto de la eklezio.

SENNACIULO estas malpermesita en Bulgario, Italio, Hungario, Litovio, Rumanio. En kelkaj aliaj landoj estas iom danĝere aboni ĝin.

Ĉu la K-doj el la “liberaj“ landoj ne forte konscios sian devon? Urĝas kompensi tiun domaĝon per senlaca varbado de novaj abonantoj.

KIEL NI FESTIS NIAN JUBILEON

La 15-an de decembro nia ĵurnalo "Ruĝarmeana Vero" festis sian jubileon pro apero de la 2000-a numero de nia ĵurnalo.

Al tiu-ĉi tago la redakcio ricevis pli ol 100 diversajn salutleterojn: de ruĝarmeaj taĉmentoj, de ruĝ-armeanoj-korespondantoj kaj redakcioj de murgazetoj, de 12 ruĝarmeaj kaj 6 laboristaj presgazetoj, de Vic-Popolkomisaro por Ruĝarmeo K-do Unŝlift, de Centra Komitato de Blankrusia Kompartio ktp. Ankaŭ nin ne forgesis niaj eksterlandaj fratoj: per esperanto ni ricevis salutleterojn de ruĝfrontbatalantoj de Okcident-Saksio (Leipzig) kaj de redakcioj: "Rote Fahne" (Wien, Aŭstrio), "Roter Soldat" (Wien), "Väst-Svenska Kurieren" (Göteborg, Svedio) kaj "Sächsische Arbeiter-Zeitung" (Leipzig).

La jubilea numero de la ĵurnalo aperis duoble pli granda: 8 paĝoj anstataŭ la kutimaj 4 paĝoj (eksterlandajn K-dojn ne mirigu nia sovetia sistemo havi malgrandajn malmultpaĝajn ĵurnalojn).

La 15-an de decembro vespere en Smolenska Domo de Ruĝa Armeo okazis solena jubilea kunveno de loka garnizono, kiun ĉeestis pli ol 500 ruĝarmeanoj. Al ĉiu ĉeestanto la redakcio donacis senpage po 1 ekzemplero de la jubilea numero.

Post raporto kaj salutparoladoj Vicestro de la Blankrusia Militregiono donacis honorajn poŝhorloĝojn kun salutsurskribo al la plej malnovaj laborantoj de la gazeto: kunlaborantoj de redakcio K-doj Krasnopolskij kaj Nikolskii (ambaŭ SAT-anoj), kompostistoj K-doj Nikifirov kaj Morozov, ekspedanto K-do Moŝĉerjakov kaj maŝinskribistino K-dino Sobenevskaja. Poste okazis lumbildgazeto kaj kinoprezentado.

La 16-an okazis kamaradeca vespero, vespermanĝo kaj orkestro-ludado, kiun partoprenis ĉ. 100 Gek-doj. Denove sekvis paroladoj, salutoj...

Jen kion ekzemple diris unu el la ruĝarmeanoj (ĝenerale salutis 12 ruĝarmeanoj) en la nomo de 11 000 ruĝarmeanoj-korespondantoj, skribantaj en nia militregiono:

— "Ruĝarmeana Vero" estas la plej ŝatata de ni ĵurnalo. En ĝi ni trovas ĉion, kio interesas kaj allogas la ruĝarmeanojn. De la unua horo ĝis la lasta, kiam ni troviĝas en Ruĝarmeo, "Ruĝarmeana Vero" estas nia amiko kaj helpanto, instruisto de militarto kaj politika gvidanto.

Kaj responde laboristoj kaj kunlaborantoj de la ĵurnalo unuvoĉe akceptis rezolucion, en kiu ili solene promesas:

— "Novaj miloj da ekzempleroj de nia ĵurnalo estos la kugloj, per kiuj ni trapafos la koron de mondkapitalismo, kaj brikoj por konstruo de forta laborista armeo.

Smolensk, Sovetio. *RO—NO.*

TAGO EL MIA VIVO

Mi estas kamparanino, 23-jara, loĝanta en kolonio Dolinskaja apud la granda samnoma fervoja stacio en Ukrainio. Ĉirkaŭe tra centoj da kilometroj etendiĝas senfina ebena huma stepo. Nek arbareton, nek rivereton vi trovos sur tiu ĉi ebenaĵo, kiu tamen per siaj abundaj rikoltoj de tritiko nutras ne nur lokan loĝantaron, sed preskaŭ la duonon de Sovetio.



Kaj en tiu ĉi loko, nenien forveturante, mi pasigis tutan mian vivon en mia familio, kiu konsistas el maljuna patro, patrino kaj 13-jara frato. Venis julio — la tempo de la plej intensa laboro sur kamparo, kies rezultojn ni utiligos dum la vintro.

Jam je la 4-a matene, rapide ellitiĝinte, mi tuj kuras la korton por nutri kaj trinkigi la ĉevalojn kaj prepari ĉion necesan por la dumtaga laboro.

Kaj jen la patro kaj mi forveturas la kamparon por resti tie ĝis la vespero. Estas facile kaj ĝoje labori sur kamparo dum fruaj matenaj horoj, kiam freŝiganta venteto karesas la bruston de la tero kaj en la koro disfloras revoj. La laboro daŭras ĝis la naŭa, poste mallonga interrompo — matenmanĝo, kaj denove laboro ĝis la tagmezo.

Post la tagmanĝo la laboro fariĝas

Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo

(Daŭrigo dekkvina)

Dum la daŭro de kelkaj jarcentoj, Romo malrapide sed konstante plilarĝigis sian agadkampon; ĝi trudis sian regadon al senĉese pligrandiĝanta nombro da popoloj; ĝi ankaŭ konstruadis vojojn, pontojn, akvokondukilojn. La komunikoj inter la diversaj konkeritaj popoloj fariĝis pli regulaj kaj pli oftaj. Ĉesis la militoj inter la civitoj. Grandskala komercado mara kaj tera kreiĝis kaj interligis okcidenton kaj orienton...

La unuaj Sennacianoj

La ekonomia neceseco postulis tian senĉesan plilarĝiĝon kaj Romo estis helpata en tio per la fakto, ke en la civitoj de Grekio kaj Italio la bataloj inter la klasoj iom post iom detruis la hejman patriotismon. La malnovaj religiaj kredoj konstante perdis influon. La hejmaj dioj ne plu estis adorataj kun la sama fervoro kiel dum la primitiva epoko. Pro kutimo oni ja daŭrigis kulti al tiuj malnoviĝintaj diaĵoj, sed vera kredo forestis. Laŭgrade kiel plilarĝiĝis kaj oftiĝis la rilatoj inter la diversaj popoloj, foriĝis la malnova ideologio. Vera revolucio intelekta okazis. Filozofio aperis kaj enkondukis la arton rezonadi racie. Kelkaj spiritoj konceptis la ideon pri ekzisto de nur unu sola dio. Eĉ la materialismo havis tiuepoke adeptojn en la persono de Demokrito, de Epikuro, de Lukrecio kaj de aliaj malpli famaj pensuloj.

Tiu idea aliiĝo okazis unue en Grekio. Tie la indiferenteco pri patriotismo estis jam sufiĉe disvastiĝinta, kiam enveni la romanoj. Unue Pitagoro malatentis la civitan religion kaj havis pli malpli klaran ideon pri iu dio-reganto de la universo. Anaksagoro ne plenumis siajn civitajn devojn kaj rifuzis akcepti oficialajn postenojn. Pro tio la ateneanoj kondamnis lin je morto.

Poste la sofistoj aŭ retoroj, inter kiuj la plej famaj estis Protagoro, Gorgo kaj Prodiko el Keoso, senkompate batalis kontraŭ la antaŭjuĝoj. Ili sentime esploris kaj kritikis la leĝojn, kiuj regis ankoraŭ la familion kaj la ŝtaton. Oni akuzis ilin pri senmoraleco kaj senpatriotismo. Verdire ili ne havis difinitan doktrinon kaj celis ĉefe instrui la arton rezonadi logike; ili direktis la sagojn de sia spriteco kaj elokventeco kontraŭ la tradicion. Vane la ateneanoj forpelis Protagoron kaj bruligis liajn skribaĵojn; la instruado de la sofistoj estis multefika. Forfalis la malnovaj kredoj kaj estiĝis liberpensado.

Sokrato ankaŭ malakceptis la tradiciajn leĝojn kaj argumentis, ke la kondutreguloj estas gravuritaj en la konscienco de l' homo. Li instruis, ke la principo de la devo kuŝas en la animo de l' homo. Kvankam li daŭrigis ĉeesti la religiajn festojn kaj partoprenis la oferojn, li tamen estis akuzita pri senreligieco kaj kondamnita trinki cikuton. Li do pereis pro siaj atakoj kontraŭ la malnova tradicio. Tamen venkis la novaj ideoj. La greka socio ĉiam plilibériĝis el la malnovaj kredoj kaj institucioj.

Post la morto de Sokrato, la filozofoj tute libere diskutadis pri la principoj kaj reguloj de la homa socio. Plato proklamis, kiel la sofistoj kaj Sokrato, ke la reguloj de moralo kaj politiko kuŝas en la racio, ke la tradicio estas nenio kaj ke la leĝoj estas justaj nur se ili estas raciaj. Aristotelo pli precize diris: "La leĝo, ĝi estas la racio". Li malkonfesis la religian originon de la homa socio kaj instruis, ke la ŝtato devas esti asocio de egaluloj, kiuj celas senpenan kaj feliĉan ekzistadon.

Kaj fine la cinikula skolo malkonfesis ĉian patrion. Diogeno sin gloris pro tio,

jam pli laciga. Varmega julia suno bruligas nin senkompate, turmentas la soifo kaj abunda ŝvito fluetas tra la korpo. Malestas lageto aŭ ia alia akvejo, en kiu oni povus sin freŝigi. Sed jen alproksimiĝas krepusko kaj ni revenas hejmen. Eble, la leganto ekpensos, ke mia labortago jam finiĝis. Tute ne. Mi havas ankoraŭ sufiĉe da devoj. Jen oni devas kuri al partia kunsido aŭ al virina organizo, jen partopreni komjunularan kunvenon, viziti "la domon de kamparanoj." Kun ĉi domo estas kunligitaj miaj plej agrablaj rememoroj. Dum la vintro de l'jaro 1925/26 mi partoprenis tie esperantistan rondeton kaj finis la kurson de esperanto. De tiu tempo mi legas "S-ulon" kaj tiamaniere mi estas altirita al internacia laborista movado kaj havas eblecon senpere konatiĝi kun la vivo de miaj alilandaj Gek-doj. Kun kelkaj el ili mi starigis eĉ pli proksimajn kamaradecajn interrilatojn per korespondado.

En la domo de kamparano krom la esperantista ekzistas ankaŭ kelkaj aliaj rondetoj: kooperativa, pafada, ĥora, dram-amatora, ktp.

Nuntempe mi vizitas la pafadan rondeton, en kiu la okupoj okazas ĉiudimanĉe, kaj dram-amatoran rondeton, sed partopreni je spektakloj pro manko da libera tempo dum somero, mi povas tre malofte. Kiam la vespero estas tute libera, kunvenas kelkaj geamikoj ĉe mi kaj kune ni iras promeni sur bulvardon apud fervoja stacio, kie ludas la muziko, aŭ vizitas la fervojan klubon, en kiu estas demonstraciataj lumbildoj.

E. Nesvitajlo (7100).

★ DIVERSAĴOJ ★

2796 parolataj lingvoj

Ni opinias, ke la plej multaj homoj ne scias, kiom da lingvoj estas parolataj en la tuta mondo. Por informi niajn K-dojn, kiom granda estas la "turo de Babelo" ni simple citu fakton per malgranda statistiko. Laŭ la geografiaj kaj etnografiaj scioj de la statistikuloj ŝancelas tiuj ciferoj, ĉar la graveco de la unuopaj idiomoj estas diverse enordigitaj. Laŭ la kalkulado, kiun oni objektive valorigas, ekzistas nun *2796 parolataj lingvoj.* — La 860 ĉefaj lingvoj dividiĝas jene: Eŭropo 48, Azio 153, Afriko 118, Nord- kaj Sud-Afriko kune 424, Oceanio 117. — Ni, esperantistoj, jam solvis tiun grandan prilingvan problemon, necesas nur, ke la homoj lernu kaj uzu tiun ilon: esperanto!

Rolo.

Jam ili ridis....

Kiam en la jaro 1791 la fama fizikisto *Galvani* demonstris sian eltrovon, la elektran fluon, per eksperimento je ranaj femuroj, ĉiuj ĉeestantaj instruituloj ridegis dum la parolado de Galvani. Oni nomis lin de nun "Danc-instruisto por ranoj"! Same oni malpermesis al li, publike paroladi pri sia eltrovo "galvana fluo elektra". Kiam *Franklin,* la inventinto de la fulm-kondukilo (fulm-ŝirmilo), paroladis pri sia inventaĵo, antaŭ granda aro de instruituloj kaj sciencistoj en London, ... ĉiuj ĉeestantoj ridegis. Eĉ oni malpermesis al li, *presigi* sian paroladon!

En j. 1887 multaj miloj da homoj priridis ankaŭ esperanton. Ĉu nuntempe oni *ankoraŭ* ridas pri mondhelplingvo?! *(1851.)*

Por nia Distro

En elegantan Berlinan kafejon eniris laboristo en laborvestoj kaj sidiĝis ĉe tablo, kie sidas kelkaj nobeluloj. Tiuj multe indigniĝas pri la "proleto" kaj fine iu alparolis lin: "Pardonu, ni estas aristokratoj..." "Sed tio tute ne ĝenas min", respondis serene la laboristo, "se vi dece kondutas, vi povas trankvile resti sidantaj ĉi tie!"

* * *

En buĉistvendejon, kie estis kelkaj aĉetemaj laboristoj, subite eniris oficiro kaj tuj alparolis la buĉiston: "Sinjor' buĉisto, donu al mi tuj kvaronfunton da laborista kolbaso por mia hundo". "Ne", kriis unu el la laboristoj, "unue donu al mi, ĉar mi estas je la vico. Mi nur volas kvaronfunton da oficira kolbaso por mia porko!" (En Germanio aĉa speco de kolbaso estas nomata "laborista kolbaso".)

*

Senlaboruloj interparolas:

"He, Kuĉjo, se estus vera la proverbo «tempo estas mono», kiom riĉegaj ni estus!" *(3018.)*

ke nenie li havis civitanan rajton. Krateso diris, ke lia patrio konsistis el la malŝato, kiun li havas por la opinio de ceteraj individuoj. La cinikuloj instruis, ke la homo estas civitano de la universo, ke la patrio tute ne estas la mallarĝa urblimo. Ili konsideris la civitan patriotismon kiel nepre forigendan antaŭjuĝon.

Zenono kaj liaj disĉiploj ankaŭ instruis, ke ĉiuj homoj devas sin konsideri kiel samregnanoj. Per tio, ke ili plilarĝigis la homan socion, la stoikuloj emancipis la individuon. Same kiel ili malakceptis la civitan religion, ili ankaŭ rifuzis konsenti pri ia ajn civitana servuteco. La homo ne devas esti oferata al la ŝtato. Ekzistas aliaj devoj ol tiuj al la ŝtato. Zenono proklamis, ke la homo havas per si mem dignecon, ke la pleja devo ne estas morti por la ŝtato, sed virte vivi.

Tiaj estis la ideoj en Grekio du jarcentojn a. K. La civita religio, t. e. la patriotismo estingiĝis. La ĝenerala spiritostato alcelis unuecon kaj tio klarigas kial la grekoj ne havis por Romo malamon. Male ili admiris la grandan civiton; ili starigis al ĝi templojn kiel al ia diaĵo. Urboj forgesis sian civitanan religion kaj anstataŭe adoris la diinon Romon kaj la dion Cezaron. Ĉiu homo klopodis fariĝi Roma civitano. Unuj akiris tiun rajton per mono aŭ per bonaj servoj al la imperiestro. Kiu fariĝis Roma civitano, tiu ne plu apartenis politike al sia naskiĝa urbo. Li ne plu dependis de ĝiaj leĝoj.

Post kiam deko da generacioj sopiris al la akiro de la Roma civitaneco, estis eldonata dekreto, kiu donis tiun titolon al ĉiuj liberaj homoj. Nur la sklavoj ne povis profiti je tiu privilegio. Tiam de la rivero Eŭfrato ĝis Hispanio, de Britio ĝis Sahara, ekzistis nur unu sama popolo, nur unu sola ŝtato. Ĉiuj malgrandaj patrioj iom post iom estis malaperintaj.

(Pluo sekvos.) *E. Lanty.*

E. IZGUR

NUR VOLU!

La festo de laboro kaj paco
Unuamaja kanto de ribelo

Eldono dua, reviziita kaj ilustrita

Prezo: 0,70 mk. g.

Mendu ĉe Administracio de SAT

Rich. Lerchner, Leipzig O 27
Colmstr. 1 (Germ.)

Al la Abonantoj de "Sennacieca Revuo"!

Jen bona okazo por riproĉi al la Gvidantaro de SAT. Kvankam ĝi promesis, ĉe la lasta kongreso, ke la aperado de "SR" fariĝos regula, ni tamen devas sciigi, ke la redaktoro de la scienca serio ne sukcesis liveri al la presejo la materialon por la januara n-o. Diversaj neantaŭviditaj laboroj kaj klopodoj malebligis, ke li plenumu sian redaktoran taskon.

Kaj estas al ni ankoraŭ pli riproĉinde (?), ke la karto per kiu K-do Demidjuk, sciigis, ke ni klopodu por anstataŭi lin en la pretigado de tiu kajero, perdiĝis survoje. Tro malfrue ni do eksciis flanke de nia Administranto, ke ne alvenis el Moskvo la manuskriptoj por la januara n-o de "SR".

Tial ni bedaŭre devas informi la abonantojn — ke la venonta scienca kajero estas *duobla*...

Al la legantoj!

Pro cirkonstancoj tute sendependaj de mia volo, ne aperas en ĉi semajna n-o de "S-ulo" la daŭrigo de mia raporto pri Sovetio. La interesiĝantoj paciencu ĝis venonta semajno, kaj dume korektu la preseraroj, kiuj svarmas[1]) en la parto de miaj impresoj enpresita en n-o 172.

Paĝo 127, dua kolono, ĉapitro "Ekonomia Situacio", linio 18, legu: Ĝi komprenebligas, kial *nerevoluciuloj* (anstataŭ ni revoluciuloj). — Tria kolono, salajra ŝtuparo, 11-a ŝtupo, legu: laborestroj (anstataŭ laboristoj). — Tria kolono, dua piednoto, lasta linio, legu: 225 rublojn (anstataŭ 228 rubloj). *G. Salan.*

[1]) Pri tiu svarmado kulpa estas la aŭtoro mem, kiu skribas nelegeble. — *Red.*

SENNACIULA SPORTA PAĜO

Kompilanto: Ad. Wendt, Leipzig O 27, Lange Reihe 11-a (Germ.)

Vekiĝu!

Jam plurfoje ni alvokis en la linioj de nia "Sporta Paĝo" al kunlaboro en prisportaj demandoj. Certe jam estas konstateblaj kelkaj sukcesoj, tamen tiuj ne ekvilibras kun la rapideco per kiu nia ideo, dank' al la subteno de kelkaj gvidantaj K-doj el la sportmovado, nun eniras la praktikan vivon de la laboristsporto. Ni nur atentigas pri la agado de la Socialista Sport-Internacio Laborista, kiu depost septembro regule aperigas sian presservan materialon en esperanto. Multaj K-doj jam nun en sindonema laboro utiligas al si kaj al nia SAT-movado ĉi tiun entreprenon. Rekompence SSIL nun ankaŭ aktive subtenas nian movadon per akcepto de poresp-aj artikoloj en sia faka gazetaro. Sekve de tio en multaj landoj jam estas konstatebla vigliĝo de la intereso por nia lingvo en sportaj rondoj. El tio tamen nun ankaŭ rezultiĝas la devo, ankoraŭ pli streĉi niajn fortojn. Do ni denove alvokas: Kunlaboru al "Sporta Paĝo de S-ulo". Sendu ankaŭ raportojn por la presservo de SSIL kaj anoncu vin kiel peranto por la vialanda gazetaro laborista. *(2518.)*



Skisalto ĉe vintra sportfesto de la laboristaj sportuloj en Johann-Georgenstadt (Germanio).

Sporta Frenezeco de Eŭropa Burĝaro

(El interparolo kun A. V. Lunaĉarskij).

Popolkomisaro por klerigo — A. V. Lunaĉarskij, al kiu ni turnis nin kun la peto, diri al ni siajn impresojn pri la sporto en Okcidenta Eŭropo, notas antaŭ ĉio, ke kune kun Ameriko kaj Anglio la sporto lastatempe okupis gravan lokon en la landoj de la eŭropa kontinento. La burĝa sporto emas al jenaj karakterizaj, iufoje kriplaj trajtoj: La burĝa sporto havas antaŭ ĉio akre esprimatan klasan karakteron, kiu estas diktata pro la deziro krei pli fortajn, pli rapidajn, pli energiajn kaj pli scipovajn homojn por venonta socia batalo. Krom tio ĝin karakterizas treege kriemaj kaj komercemaj delogoj al rekordoj. Kiam temas pri tielnomataj mondaj rekordoj, la burĝaro elmontras ridindan aspekton, ĝi pagas grandegajn monsumojn kaj donas ateston pri morala mizereco. Unu homo disbatas al alia homo la vizaĝon, kaj ĉi fakto eklipsas la plej grandajn sciencajn eltrovojn, ŝanĝojn de ministerioj, naciajn kongresojn ktp. ... Sed la honorario, ricevata de vizaĝdisbatintoj kaj venkitoj, superas 50-oble la perlaboron de honesta kaj talenta kuracisto aŭ agronomo.

Fine krom forlogo al rekordoj, la burĝaro donas al sporto tute neproporcie gravan lokon meze de aliaj aperoj de l' vivo. Ekzemple, en multaj amerikaj universitatoj ekzistas, kreitaj de amerikaj milionuloj kaj miliarduloj, mirindaj, laŭ sia grandeco kaj riĉeco, sportaj kluboj, placoj ktp.... Kaj apude kun tio iufoje la plej gravaj sciencaj laboratorioj estas aranĝitaj kun ridinda por Ameriko avareco.

Nia sporto devas konsideri ĉi mankojn kaj eviti ilin. Al penegoj de burĝaro ni devas kontraŭstarigi korpkulturan sinpreparon de laboristoj. Portante antaŭ ĉio utiligan karakteron, t. e. celante korpkulturan disvolviĝon de masoj, sovetia korpkulturo devas allasi ankaŭ konkurencon, kiom ĝi kunportas la vivon en sporta afero, sed neniaokaze forgesi ĉi-tie mezuron. La sporto ne devas eklipsi la pli gravajn por ni taskojn de l' socia, politika kaj teknika kulturkresko.

Mi opinias — diris K-do Lunaĉarskij, ke por ni estas ankaŭ grave kombini sportan sinpreparon al la milita defendo. Mi opinias, ke la ideoj kaj taskoj de Ruĝa Sportinternacio estas ĝustaj. Ili akcelas disvolviĝon de memstara laborista sporto en la tuta mondo.

(El Korpkulturo kaj Sporto — Moskvo)
Trad. A. Lebedev. Tver.

* * *

Tre trafe K-do Lunaĉarskij pritraktas la ideologion laŭ kiu estas regata la sporto inter la burĝaro de l' tuta mondo, Tamen ni ankaŭ ne forgesu atentigi pri grava danĝero, kiun kreas tiuj rondoj. Ili estas laŭŝajne neŭtralaj rilate al politikaj aferoj. Verdire tia neŭtraleco nur estas narkotilo servanta al sendolora inokulo de la veneno de naciismo kaj militemo. For la neŭtralismon ankaŭ sur tiu ĉi kampo. Eksiĝu el la burĝa sportmovado, fondu proprajn laboristajn sportunuiĝojn, unuvorte: aliĝu al la laborista sportmovado!

Ciferoj el la laborista sportmovado

Sportspecoj, praktikataj en la asocioj de la SSIL

Laŭ raporto, farita de la sekretario de SSIL al la kunsido de la Internacia Oficejo, la sporta vivo en SSIL estas jena: Entute el 24 landoj apartenas societoj al SSIL. Gimnastiko estas praktikata en 19 landoj, sportludoj en 13, dromsporto en 17, pezatletiko en 13, ciklado en 8, piedpilko en 19, teniso en 4, akvosporto en 14, vintrosporto en 10, militsporto en 3, hokeo en 2, radio en 2, flugsporto en 1, pafado en 2, migrado kaj turismo en 8, ĝiu-ĝicu en 1, sanigula servo estas en 3 landoj, socialista junularo en 3, boksado en 3, fiŝkaptado en 1 kaj nudkulturo en 1 lando. Gimnastiko, dromsporto kaj piedpilko do estas la ĝenerale plej disvastigataj sportspecoj.

TRA ESPERANTIO

La fuŝistoj de la mondlingvo

Ili estas multaj kaj diversspecaj. Hodiaŭ ni parolu nur pri unu speco: la idista.

Ĉiu el ni sendube havis la okazon aŭdi K-dojn-idistojn paroli kun fanatika konvinko kaj aplombo pri la supereco de la lingvo "di la Delegitaro" kompare kun nia "arĥaika" esperanto. Per ŝajne sciencaj argumentoj ili "pruvis", ke ido estas la definitiva solvo de la mondlingva problemo. Sekve ĉiuj nefanatikaj esperantistoj devus pli malpli frue nepre aliĝi al la ida movado.

Nu, kio okazis? Siatempe (antaŭ eble du jaroj) ni sciigis en "S-ulo", ke Vienaj idistoj, organizintoj de la unua ido-kongreso, transiris al la nova projekto de lingvo nomita *occidental*. Tio estis la unua fendo. De tiu tempo konstanta krizo regis en la idistaj rondoj. Kaj jen en la januara numero de *Kosmoglotta*, bone konataj gvidantoj de la francia idistaro sciigas, ke ili ankaŭ forlasas idon kaj aliĝas al *occidental*.

La samaj homoj, kiuj asertis, ke ido ne estas superebla, ke ĝi estas la scienca solvo de la problemo ktp. hodiaŭ diras la samon pri la nova projekto de lingvo. Ĉu tio ne pruvas klare, ke tiaj "mondlingvaĵoj" estas blindaj? Ili ĉagrene konstatis, ke ido neprosperas, ke ĝi tute ne povas forpuŝi esperanton. Anstataŭ tiri el tiu konstato logikan konsekvencon, t. e. ke nia movado jam havas profundajn radikojn en la vivo, ke ĝi sekve estas nedetruebla, ili kulpigis sian propran lingvon kaj alprenis novan — pli bonan! ? — sendube definitivan!!?...

Kompatinduloj! Ne necesas funde lerni tiun novan elpensaĵon por akiri la konvinkon, ke ĝi estas ... eĉ pli malbona ol ido. Almenaŭ estas tute certe, ke neniam la orientanoj akceptos tiun komplikan okcidentaĵon.

La idistoj sin montris kiel majstro-fuŝistoj en la mondlingva movado. Per blufo, per mensogoj kaj kelkfoje per aliaj malhonestaj rimedoj ili provis detrui la esperantan movadon. Ili nur sukcesis malrapidigi nian antaŭeniradon. Ili prokrastigis la ĝeneralan uzadon de esperanto. Sendube la okcidentalistoj provos fari la samon...

La likvidiĝo de l' idista movado almenaŭ firmigas nin en la konvinko, ke ni paŝas sur la ĝusta vojo. Ni daŭrigu senlace, nin apogante sur nia firma Zamenhofa Fundamento; ĉiufake ni apliku nian vivantan lingvon — kaj traktu kiel decas la fuŝistojn de la mondlingvo.

E. L.

El la Administrejo

Al la membroj kaj abonantoj en Sovetio

Niaj oficialaj SAT-agentejoj estas:

1. *CK de SEU, Poŝtkesto, 630, Moskvo.*
2. *"Esperanto", Kremenĉug, Ukrainio.*
3. *D. Sneĵko, Poŝtkesto, 33, Minsk, Blankrusio.*

La unua estas nia ĉefagentejo, la aliaj du estas helpagentejoj. "Esperanto", Kremenĉug zorgas pro la suda parto de Sovetio kaj Minsk por Blankrusio. Tiele ni senŝarĝis nian ĉefagentejon en Moskvo, ĉar K-do Demidjuk jam daŭre ĝemis sub la ŝarĝo de la laboro. Al tiuj agentejoj oni sendu ĉion, kio rilatas al la SAT-administrejo. Artikolojn por la redakcio oni sendu rekte al Paris. Kiel agu niaj klientoj? Ili sendu rekte la monon al iu de nia agentejo, koncize indikas la celon de la pago. Aliĝilojn kaj informon vi sendu al Leipzig. Per tiu procedo vi plirapidigas la sendon de viaj menditaĵoj. Kompreneble tion vi povas fari laŭ via plaĉo. K-doj, kiuj ne ŝatas aparte skribi al Leipzig, povas ankaŭ transsendi la monon kun la necesa informo al niaj agentejoj. *Tre necese estas, ke ĉiam la pagita sumo koincidu kun la sciigita sumo,* aliel okazas miskompreno.

Mendojn al libroj kaj gazetoj, kiuj ne aperis aŭ aperas en *nia eldonejo* ni nur plenumas post sciigo aŭ monricevo flanke de niaj agentejoj. Aparte ni atentigas la mendantojn al fremdaj libroj, *ke ili ne forgesu aldoni 10 % por la sendkostoj.* — Same ni atentigas kelkajn K-dojn, kiuj ofte petas la SAT-administrejon peri monsendojn al iuj personoj aŭ societoj, ke oni aldonu 5 % pli de la pagota sumo, aliel ni devas rifuzi tiujn transpagojn. Ni ne emas, ke SAT pagu tiujn kostojn.

Ĉe demandoj al Adm. de SAT ĉiam aldonu, ĉu viajn resp. kartojn, ĉu poŝtmarkojn. Aliel ne miru, se vi ne ricevos respondon.

Ofte K-doj mendas pli grandan kvanton da libroj aŭ poŝtkartoj, kaj poste ili miras, se ni sendas tiujn librojn en kelkaj malgrandaj pakaĵoj. Ja volonte ni sendus grandajn pakaĵojn, sed ne eblas. Inter viaj doganoficistoj estas burokratoj, kiuj obeas la literon kaj resendas niajn pakaĵojn. La aspekto de tiuj revenintaj pakaĵoj estas ofte terura. Niaj K-doj ĉiel devas klarigi al tiuj doganistoj kaj ĉefe en Ukrainio, ke oni senĝene tralasu *niajn librojn* ankaŭ plurekzemplere. Ĉar ja estus malinda ago, se proleta *ŝtato malhelpus* proletan organizon.

Ĉiu ero da energio, ĉiu centimo donita al la neŭtrala esperanta movado signifas ioman perfidon al la laborista!

Internaciaj respondkuponoj

Per tio ni avertas niajn K-dojn, ĉefe en Aŭstrio, ne pagi per internaciaj respondkuponoj. Per tiu ago vi nur multekostigas la tutan aferon. Se temas pri tute malgrandaj sumetoj oni povas konsenti, sed ĉe grandaj ne. Vi devas konsideri, ke ni nur ricevas po respondkupono la ekvivalenton de 0,25 mk. g. t. e. la afrankvaloron de eksterlanda letero.

Adm.

8-a Kongreso de SAT en Göteborg (Svedio)

(14—19. aŭgusto 1928)

Ĉion, kio rilatas al la kongreso adresu al: *Einar Adamson, Box 73, Göteborg, Svedio.*

4-a Komuniko

La urbo subvencias. La kongresa komitato petis la urban konsilantaron pri subvencio de 2000 sv. kr. Ĉe la plenkunsido de urbestraro de Göteborg la 12-an de januaro, konservativulo, lektoro de angla lingvo kontraŭparolis la proponon. Post diskutado inter li kaj K-do Adamson la urbkonsilantaro voĉdonis 32 voĉoj por subteno kaj 17 kontraŭ. Ĉiuj socialdemokratoj, komunistoj kaj liberaluloj voĉdonis por kaj ankaŭ unu burĝa konsilanto. Ili argumentis sian subtenon per la motivigo, ke estis reprezentada demando. Do, la kongresa komitato por diversaj elspezoj ricevas 2000 sv. kr. de la urbo Göteborg. Tiu subteno certe multe helpos nin malaltigi la kostojn por la vizitontoj.

Studenta fakkunsido okazos dum la 8-a SAT-kongreso. Studentoj, kiuj partoprenos, interrilatu kun K-do Dim. Sneĵko, poŝtkesto 33, Minsk, Sovetio.

Fakkunsido de metalistoj okazos. La metala sindikato de Göteborg gvidos kaj organizos fakkunsidon de metalistoj; kiu partoprenos interrilatu kun K-do metalisto Anton Norling, Gamlestadsvägen 5—7, Göteborg.

La 2-a listo de aliĝintoj

33.	K-do Ernst Eriksson, Stockholm, Svedio	11020
34.	K-do Eskil Henriksson, Sm. Anneberg	10648
35.	K-do C. A. Danielsson, Nygard	
36.	K-dino Helmi Dresen, Tallinn, Estonio	4227
37.	K-do Samson Kletenik, Rostov Don, USSR	5430
38.	K-do Karl Johannsson, Eksjö, Svedio	994
39.	K-do Karl Karlsson, Nynäshamn	607
40.	K-do Arvid Karlsson, Göteborg .	212
41.	K-do Boris Stepanov, V. Dolgoje, Orlovs, USSR . . .	7786
42.	K-do Karl Holmberg, Göteborg Svedio	7839
43.	K-do Arvid Agren, Eskilstuna . .	4699

44. K-do Sinclair Söderberg, Norrahammar 7430
45. K-do Anders Pettersson, Göteborg 4694
46. K-do Howard Stay, Bournemouth Anglio 2978
47. K-do Kurt Klaps, Danzig, Libera Ŝtato Danzig 2421
48. K-do Richard Lerchner, Leipzig, Germanio 90
49. K-dino Charlotte Lerchner, Leipzig, Germanio 2465
50. K-do Robert E. Bitzer, München, Germanio 1810
51. K-do Konrad Deubler, München, Germanio 30
52. K-do Erik Büttner, Dresden, Germanio 7176
53. K-do Adolf Ilgner, Lünen, Germ. 7514
54. K-do Mark Starr, London, Anglio 488
55. K-do Willi Qualitz, Henningsdorf, Germanio 5644
56. K-do Aleksander Lebedev, Tver USSR 960
57. K-do Francisko Azorin, Còrdoba, Hispanio 3681
58. K-do Ber Perelŝtein, Moskva,USSR 3940
59. K-do Nils Nordlund, Kristianstad, Svedio . . . .
60. K-do Carl Mailand, Cassel, Germ. 265
61. K-do L. Glodeau, Paris, Francio 50
62. K-do H. Cachon, Paris, Francio 24
63. K-do B., Pariș, Francio 11
64. K-do Peter Klopfleisch, Leipzig, Germanio 920
65. K-do Max Häckel, Leipzig, Germ. 1162
66. K-do Karl Götze, Altenburg, Germ. 6419
67. K-do Fritz Götze, Altenburg, Germ. 5569
68. K-do Wilhelm Michalski, Berlin, Germanio 9534
69. K-do Willi Reinicke, Dresden, Germ. 7172
70. K-do Johano Bruckner, Pottenstein, Aŭstrio 5412
71. K-dino Beatrice France, Handfort, Anglio 508
72. K-do V. Kalaŝnikov, N.-Novgorod, Sovetio 125
73. K-do Albert Falkovski, Essen, Germ. 8800



Ne forjetu Sennaciulon!

Se estus eble, ekscii la lastan restadejon de *ĉiu* eldonita numero de nia asocigazeto . . . tiam ofte ni sciiĝus, ke "S-ulo" kuŝas en iu ajn angulo; aŭ eĉ, ke ĝi "fimortis sen honoro kaj sen utilo" . . . Mi jam ofte vidis kaj spertis jenon: La abonanto ekrigardas la gazeton aŭ legas nur unu artikolon; poste "S-ulo" malaperas en malhelan angulon. Gek-doj el multaj landoj oferadas tempon, monon kaj spiriton por nia SAT-ideo. *Pro tio estas devo* de abonanto de "S-ulo" *legi* ĉion, — *traduki* nacilingven artikolojn por unuiĝoj, al kiu li apartenas, — *varbi* por anoncoj, inter tiaj organizoj, en kiuj ekzistas intereso por ideoj, — *uzi artikolojn* el "S-ulo" dum (paroladoj) inter la proletoj, — *kolektadi* ĉiujn numerojn, por ke ili estu binditaj kiel libro por bibliotekoj.

Ĉiuj Gek-doj helpu, ke "S-ulo" estu uzata ĉe ĉiu okazo. Ideo povas kreski nur per flegado de ĝi; la ĝardenisto (SAT-estraro) ne *sole* povas varti la florojn (SAT kaj ĝiajn organojn) en la ĝardenego. — La helpantoj ankaŭ plenumu siajn devojn! Kaj helpantoj ni ĉiuj estu! *(1851.)*

Artaj poŝtkartoj de SAT

Jen kion skribas K-do 10 262:

"Vi ne povas imagi, kian ĝojon faris al mi la ricevitaj ilustritaj pk. de nia kara Asocio. Ili montras vere sennaciecan arton. Ili donis al mi multe pli da forto kaj entuziasmon . . . Do, vivu Sennacieco!"

Aĉetu kaj helpu vendi ilin inter la laboristamasoj per tio vi servas al esperanto, Sennaciismo kaj al via Asocio SAT!

Tuta serio (5 kartoj) inkluzive afranko nur 0,50 mk. germ.

"SAT", Colmstr. 1, **Leipzig O 27** (Germanio).

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

Bulgario. En *Sliven* estas komencinta kurso por laboristoj. Ĉ. 30 lernantoj. — **Francio.** En la vegetara restoracio de "Trait d'Union", 73bis rue Bobillot, Parizo 13e, estas speciala tablo kun verda flago por K-doj, kiuj povas paroli esp-e. — **Sovetio.** En *Barnaul* funkcias 3 rondetoj. Dum la festo de Oktobra Revolucio flirtis esp-aj standardoj kaj aŭdiĝis esp-aj revoluciaj kantoj. En *Novorossijsk* (Kaŭkazo) okazas multaj kursoj. La 15-an de januaro estis la 1. Konferenco de esp-istaj rondetoj. Ĉeestis 24 delegitoj. — **Usono.** En *Nov-Jorko* reorganiziĝis la laborista grupo *"Esperanta Laborularo"*. Profitante el la antaŭaj spertoj ni decidis jenon: "Ĉiu malnova membro devas resti membro de SAT k. la novaj devas aliĝi al SAT en la daŭro de 6 monatoj. SAT-reguloj estu kiel gvidilo por la nova organizo." La sekvanta oficistaro estis elektita: Organizisto: K-do Hermann Wuttke. Protokol- k. korespond-sekretario K-do George Saville. Financ-sekretario K-do Jack Feurer. Literatur-prizorganto K-do Alfons Pichler. Pres-komitato K-do Herco Orfo (nova SAT-ano) por "Freiheit", "The Daily Worker", "Novij Mir" ktp. K-do Oholeay por mur-gazetoj k. K-do Hermann Wuttke por "New Yorker Volkszeitung".

SAT-anoj!

En viaj korespondaĵoj al la Administrejo ĉiam citu vian membro-numeron.

MEMORNOTO

Represis el "Sennaciulo":

Juna Teksisto, Ivanovo, 20. 12. 27: Homaj aŭtomatoj. — *Nova Doba, Plzen,* 12. 1. 28. La faŝismo en Meksikio. — *Volksstimme,* Chemnitz, 1. 11. 27: Sukcesplena batalo por la okhora labortago en Hispanio, 23. 11. 27: La libroproduktado en Eŭropo, 14. 12. 27: Laboristaj kondiĉoj en Suda Afriko.

Enhavis priesperantajn artikolojn:

Freie Sport-Woche, Leipzig: 16. 1. 28. — *The Daily Herald,* London: 20. 1. 28. — The Middlesex County Times, London, 24. 12. 27.

Enhavis enesperantajn artikolojn:

Munkaskultura, Budapest: Januaro 28, tre aprobinda artikolo de K-do J. Batta: ankoraŭ pri "Festo de la libro". —

NIA POŜTO

6604. — Via traduko estas interesa k. presinda, post necesaj korektoj; kiam estos loko ni certe ĝin publikigos. — Ekzistas nur du semajnaj esp. gazetoj.

Zebu. — Via artikolo estas interesa, sed loko absolute mankas.

7439. — Se estos loko, via artikolo aperos. Estonte bonvolu prizorgi pli larĝajn interliniojn por ebligi korektojn.

Al kelkiuj. — Malgraŭ ripetitaj admonoj, oni daŭrigas sendi al la redaktejo fuŝskribitajn manuskriptojn, kio perdigas al ni multe da tempo. Sendube la eminentaj verkintoj opinias, ke estas por ni granda honoro deĉifri k. rekopii iliajn ĉefverkojn! . . . Oni ankaŭ bone notu en la memoron, ke kilometre longaj artikoloj ne estas ŝatataj de la legantoj. Dediĉu iom pli da tempo, iom pli da zorgo al via verkado k. tiel vi atingos koncizecon k. klarecon. *E. L.*

! Ĉiuj Geesperantistoj, abelkulturistoj k. Gek-doj dezirantaj peradi al la informservo nepre sendu materialon pri abelkulturo el sia lando kaj laŭeble liveru la fakrevuojn kun esperanto-tradukaĵoj de la plej gravaj artikoloj al K-do **Mikaelo Lapin, Moskvo (USSR), Sretenko Kolokolnikov 24, kv. 13.**

Ĉiu konstanta informanto ricevados samkondiĉe *unu* el la *fakrevuoj* de USSR dum la jaro 1928.

La redakcio de gubernia gazeto

"Brjanska Laboristo"

serĉas Gek-dojn el Ameriko, Anglio k. Germanio pri problemoj de partilaboro en fabrikoj, pri laboro de labkoroj k. pri murgazetoj en div. entreprenoj.

Adr.: **Brjansk, Sovetskaja 25.**

Al **redakcio de gaz. Brjanskij Rabôĉij.**



Atentu!

Esperanta rondeto de komencantoj ĉe fervoja laborista klubo dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl. PK, PI, L. Nepran resp. garantias gvidanto B. Ĵeleznjakov (SAT 5583).

Gekamaradoj, ne povantaj konstante koresp., bonvolu sendi kvankam unu salutpoŝtkarton, kiu estos nepre respondita.

Kvankam unu PK la rondeto dez. ricevi el ĉiu loko kie estas lab. geesperantistoj.

Pruvu ke ni estas ĉie en la mondo!

Korespondaĵoj estos poste uzitaj por granda ekspozicio. — La adreso estas: USSR., **Samara,** strato de Leo Tolstoj, 94, jeleznodorojnij klub. Esperanto-rondeto.

Helpu al nia propagando!

La 8-a Kongreso de la Labor. Esperantista Federacio por la franclingva teritorio okazos la 9-an de aprilo 1928 en Bourges. La tiea grupo aranĝos ekspozicion k. propagandfeston: tiucele tre utilaj estos PI (PM bfl.), L, jurnal. kaj cet. esp-aĵoj senditaj de "alilandaj" K-doj. Al ĉiu sendinto ni dankos per PI. — Adresu ĉion jene! Labor. Esperantista Grupo, 8, place Malus, Bourges (Cher), Francio.

ENHAVO:

Religia moralo . . . . pĝ. 147—48
El Estonio . . . . „ 148
Indiĝenaj moroj en Angola . . . . „ 149
La polico de Dio . . . . „ 149
Kiel ni festis nian jubileon . . . . „ 150
Tago el mia vivo . . . . „ 150—51
Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo . . . . „ 150—51
Diversaĵoj . . . . „ 151
Por nia Distro . . . . „ 151
Al la Abonantoj de "Sennacieca Revuo" . . . . „ 151
Al la legantoj . . . . „ 151
Sennaciula Sporta Paĝo . . . . . „ 152
Tra Esperantio . . . . „ 153—54
Anoncoj . . . . „ 154

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)